



## 65. MEZINÁRODNÍ KONGRES MLADÝCH ESPERANTISTŮ LA DIMANĈA SANKTA MESO DUM IJK 2009 EN LIBEREC'

ĉ = [č], ĝ = [dž], ĥ = [ch], ĵ = [ž], ŝ = [š], ŭ = [-u]

Kaj kun via spirito.

**Mi konfesas** al Dio ĉiopova kaj al vi, gefratoj, ke mi ege pekis per penso, parolo, faro kaj neglekto: Mia kulpo, mia kulpo, mia tre granda kulpo. Tial mi petas la beatan Marian ĉiam virgan, ĉiujn anĝelojn, la sanktulojn kaj vin, gefratoj, preĝi por mi al nia Sinjoro Dio.

**Sinjoro, kompatu nin.** Kristo, kompatu nin. Sinjoro...

**Gloro** al Dio en la altoj. Kaj sur la tero paco al la homoj de lia bonvolo. Ni laŭdas Vin, ni benas Vin, ni adoras Vin, ni gloras Vin, ni dankas al Vi pro via granda gloro, Sinjoro Dio, ĉiela Reĝo, Dio Patro ĉiopova. Sinjoro, Filo ununaskita, Jesuo Kristo. Sinjoro Dio, Ŝafido de Dio, Filo de l' Patro; kiu forigas la pekojn de l' mondo, kompatu nin, kiu forigas la pekojn de l' mondo, akceptu nian petegon, kiu sidas dekstre de l' Patro, kompatu nin. Ĉar Vi sola estas sankta, Vi sola Sinjoro, Vi sola Plejaltulo, Jesuo Kristo, kun la Sankta Spirito: en la gloro de Dio Patro. Amen.

**Psa 23 (22), 1-3a, 3b-4, 5, 6; resp. 1:**

**Resp:** La Eternulo estas mia paŝtisto; mi mankon ne havos.

Sur verdaj herbejoj Li ripozigas min, apud trankvilaj akvoj Li kondukas min, Li kvietigas mian animon...

**La 2-a legaĵo – el la epistolo al la Efesanoj (Efe 2,13-18):**

Nun en Kristo Jesuo vi, iam malproksimaj, proksimiĝis en la sango de Kristo. Ĉar nia paco estas li, kiu unuigis ambaŭ kaj rompis la intermuron de disigo, en sia karno neniiginte la malamon, la leĝon de ordonoj en dekretoj; por krei en si el la du unu novan homon, tiel farante pacon; kaj por kunakordigi ambaŭ en unu korpo al Dio per la kruco, mortiginte per tio la malamon; kaj li venis kaj predikis pacon al vi malproksimaj kaj al la proksimaj; ĉar per li ni ambaŭ havas en unu Spirito alkondukon al la Patro.

Al Dio estu danko.

Kaj kun via spirito.

Gloro estu al Vi, Sinjoro.

Al Kristo estu laŭdo.

**Mi kredas** je unu Dio, la Patro ĉiopova, Kreinto de la ĉielo kaj de la tero, de ĉiuj aĵoj videblaj kaj nevideblaj.

Kaj je unu Sinjoro Jesuo Kristo, ununaskita Filo de Dio, kaj el la Patro generita antaŭ ĉiuj jarcentoj. Dio el Dio, Lumo el Lumo, Dio vera el Dio vera, generita, ne kreita, samsubstanca kun la Patro: per kiu ĉio estas farita. Kiu por ni homoj kaj por nia savo descendis de la ĉieloj. Kaj per la Sankta Spirito Li enkarniĝis el Maria, la Virgulino, kaj fariĝis homo. Krucumita por ni sub Pontio Pilato, Li mortis kaj estis entombigita. La trian tagon Li resurektis laŭ la Skriboj, ascendis al la ĉielo kaj sidas dekstre de la Patro. Kaj Li revenos kun gloro, juĝi la vivantojn kaj la mortintojn, kaj lia regno estos senfina.

*Přízvuk klademe v esperantu vždy na předposlední slabiku.*

I s tebou.

**Vyznávám se** všemohoucímu Bohu a vám všem, že často hřeším, myšlením, slovy i skutky a nekonám, co mám konat. Je to má vina, má veliká vina. Proto prosím Matku Boží, Pannu Marii, všechny anděly a svaté i vás, bratři a sestry, abyste se za mě u Boha přimlouvali.

**Pane, smiluj se.** Kriste, smiluj se. Pane...

**Sláva** na výsostech Bohu. A na zemi pokoj lidem dobré vůle. Chválíme tě. Velebíme tě. Klaníme se ti. Oslavujeme tě. Vzdáváme ti díky pro tvou velikou slávu. Pane a Bože, nebeský Králi, Bože, Otče všemohoucí, Pane, jednorozený Synu, Ježíši Kriste. Pane a Bože, Beránku Boží, Synu Otce. Ty, který snímáš hříchy světa, smiluj se nad námi; ty, který snímáš hříchy světa, přijmi naše prosby. Ty, který sedíš po pravici Otce, smiluj se nad námi. Neboť ty jediný jsi Svatý, ty jediný jsi Pán, ty jediný jsi Svrchovaný, Ježíši Kriste, se Svatým Duchem, ve slávě Boha Otce. Amen.

**1. čtení – z knihy proroka Jeremiáše (Jer 23,1-6):**

„Běda pastýřům, kteří ničí a rozptylují stádo, které pasu“ – praví Hospodin. Proto praví Hospodin, Bůh Izraele, o pastýřích, kteří pasou můj lid: „Vy jste rozptýlili mé stádo a rozehnali jste ho, nestarali jste se o ně; proto já se postarám o vás pro špatnost vašich skutků“ – praví Hospodin. „Já sám shromáždím zbytky svého stáda ze všech zemí, kam jsem ho vyhnal, a přivedu je nazpět na jejich luhy, porostou a rozmnoží se. Vzbudím nad nimi pastýře, kteří je budou pást, nebudou se již bát ani strachovat, už se neztratí“ – praví Hospodin.

„Hle, blíží se dny“ – praví Hospodin, „kdy vzbudím Davidovi zákonitý výhonek, krále, který bude panovat moudře a konat právo a spravedlnost na zemi. Za jeho dnů dojde Juda spásy a Izrael bude bydlet v bezpečí. To je jméno, kterým ho budou nazývat: „Hospodin je naše spravedlnost.““

Bohu díky.

I s tebou.

Sláva tobě, Pane.

Chvála tobě, Kriste.

**Věřím** v jednoho Boha, Otce všemohoucího, Stvořitele nebe i země, všeho viditelného i neviditelného.

Věřím v jednoho Pána Ježíše Krista, jednorozeného Syna Božího, který se zrodil z Otce přede všemi věky: Bůh z Boha, Světlo ze Světla, pravý Bůh z pravého Boha, zrozený, nestvořený, jedné podstaty s Otcem: skrze něho všechno je stvořeno. On pro nás lidi a pro naši spásu sestoupil z nebe. Skrze Ducha Svatého přijal tělo z Marie Panny a stal se člověkem. Byl za nás ukřižován, za dnů Poncia Piláta byl umučen a pohřben. Třetího dne vstal z mrtvých podle Písma. Vstoupil do nebe, sedí po pravici Otce. A znovu přijde, ve slávě, soudit živé i mrtvé a jeho království bude bez konce.

Mi kredas je la Sankta Spirito, Sinjoro kaj Viviganto, kiu devenas de la Patro kaj de la Filo. Kiu kun la Patro kaj la Filo same estas adorata kaj glorata; kiu parolis per la profetoj.

Kaj je unu Eklezio: sankta, katolika kaj apostola. Mi konfesas unu bapton por la pardono de la pekoj. Kaj mi atendas la revivigon de la mortintoj, kaj la vivon en la estonta mondo. Amen.

La Sinjoro akceptu el viaj manoj ĉi tiun oferon por laŭdo kaj gloro de sia nomo, por utilo nia kaj de la tuta sankta Eklezio.

Kaj kun via spirito.

Ni havas ilin ĉe la Sinjoro.

Estas inde kaj juste.

**Sankta**, sankta, sankta estas la Sinjoro, Dio de legiaroj. Plenas de via gloro la ĉielo kaj la tero. Hosana en la altoj! Benata, kiu venas en la nomo de la Sinjoro. Hosana en la altoj!

Ni anoncas vian morton, Sinjoro, kaj konfesas vian resurekton, ĝis kiam Vi revenos en gloro.

**Patro nia**, kiu estas en la ĉielo, sanktigata estu via nomo. Venu via regno. Fariĝu via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj. Kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono.

Ĉar via estas la regno kaj la potenco, kaj la gloro eterne.

Kaj kun via spirito.

**Ŝafido de Dio**, kiu forigas la pekojn de l' mondo, *kompatu nin*.  
...donu al ni la pacon.

Sinjoro, mi ne estas inda, ke Vi eniru sub mian tegmenton, sed ĉiru nur unu vorton kaj resaniĝos mia animo.

Nun kaj eterne.

Kiu kreis la ĉielon kaj la teron.

Al Dio estu danko!

Věřím v Ducha Svatého, Pána a dárce života, který z Otce i Syna vychází, s Otcem i Synem je zároveň uctíván a oslavován a mluvil ústy proroků.

Věřím v jednu, svatou, všeobecnou, apoštolskou církev. Vyznávám jeden křest na odpuštění hříchů. Očekávám vzkříšení mrtvých a život budoucího věku. Amen.

Ať ji přijme ke své slávě a spáse světa.

I s tebou.

Máme je u Pána.

Je to důstojné a spravedlivé.

**Svatý**, Svátý, Svátý, Pán, Bůh zástupů. Nebe i země jsou plny tvé slávy. Hosana na výsostech. Požehnaný, jenž přichází ve jménu Páně. Hosana na výsostech.

Tvou smrt zvěstujeme, tvé vzkříšení vyznáváme, na tvůj příchod čekáme, Pane Ježíši Kriste.

**Otče náš**, jenž jsi na nebesích, posvět se jméno tvé. Přijď království tvé. Buď vůle tvá jako v nebi tak i na zemi. Chléb náš vezdejší dej nám dnes. A odpusť nám naše viny, jako i my odpouštíme našim viníkům. A neuveď nás v pokušení, ale zbav nás od zlého.

Neboť tvé je království i moc i sláva navěky.

I s tebou.

**Beránku Boží**, který snímáš hříchy světa, *smiluj se nad námi*.  
...daruj nám pokoj.

Pane, nezasloužím si, abys ke mně přišel, ale řekni jen slovo, a má duše bude uzdravena.

Nyní i navěky.

Který stvořil nebe i zemi.

Bohu díky.

## 1. Meskomenco (vstup)



An - taŭ Vi - a ma - jes - te - co, Di - o, ter - ge - nu - as ni, por ke Vin ni  
Vin pe - tan - te ko - ren me - ti faj - ron de la am' al Vi,  
a - mu pi - e, ki - el Vi - a an - ĝe - lar', laŭ - don pri Vi kan - tu ĉi - e tu - ta Vi - a kri - sta - nar'.

## 2. Antaŭ la Evangelio (před evangeliem)

Dia vorto montras vojon / al eterno, nia cel', / ni do sekvu ĉiun fojon / ĝin per Kristo, nia vel'. / Do purigu nian koron, / estu ĝi fruktiga ter', / kiu donas noblan floron / de la am' al Dia ver'.

## 3. Oferado (obětní průvod)

Prenu, Dio, la oferon / de la pano kaj de l' vin', / kiun donas Via tero. / Grace Vi rigardu ĝin. / Nun akceptu kun mildeco / tiujn fruktojn de la ter', / kiujn Jesu en boneco / mem elektis por ofer'.

## 4. Komunio (přijímání)

Venu al animo mia, / Jesu, milda Redemptor'! / sopiregas koro pia / je l' trezoro de l' Sinjor'. / Koro mia tremas ĝoje / en ĉiela feliĉec': / Estas nutro Vi survoje, / Vi, Jesu', sen fin' bonec'!

## 5. Fino (závěr)

Benu, Dio, la popolon, / ke ĝi vivu en konsol'. / Vian sanktan Di - ordonon / sekvu ĝi laŭ Via vol'. / Vivi por la Dia laŭdo / estu nia kor - dezir'. / Ni batalu kontraŭ peko, / agu, Di', laŭ Via dir'!